

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO

MEKSIKO, septembro 1984

Nº 4

Jen ni denove!

La longa silento niaflanke havas multajn kaŭzojn. Unu el ili estas la krizo, nia bone konata akompananto jam de pluraj jaroj. Ne pensu, tamen, ke tio sufiĉas por silentigi nin. Tute male, ĝi devus instigi nin agi kaj solvi la komplikajn problemaron de la esperanto-movado en Meksikio.

Multaj el niaj problemoj fontas el tio ke, ĝis nun, esperanto estas nekonata fenomeno por la plimulto. Sed ne sufiĉas propagandi esperanton, ne sufiĉas ke multaj personoj “aŭdu” pri ĝi. Necesas ke ni oferi al ili, samtempe, la rimedon *kaj lerni kaj praktiki* la lingvon. Eĉ se esperanto estus devige instruata en la lernejoj (kiel okazis antaŭ dudek jaroj, ĉe la Universitato, al la lernanto de profesoro Oyarzábal), kion gajnus la movado, se tiuj lernintoj neniam praktikas la lingvon? La problemo, do, estas konservi la jam interesitajn personojn. Kion fari por ke ili ne foriru?

La respondo estas oferi al ili ion interesan, ion gravan, por ke ili vidu ke esperanto estas inda je siaj klopodoj. La esperanto-movado, kiel ĉiu alia socia fenomeno, konkuras por altiri al si la intereson de la personoj. Sed ĝi konkuras kontraŭ multaj aliaj! Ĉu tio kion ni oferas estas pli alloga ol la televido? Ĉu ni rajtas esperi ke la homoj eliros el sia komforta domo, por kunsidi kaj preparoli la movadon? Kia homo estas tiu kiu, defiante la veteron eliros por ĉeesti kunsidon? Se la kunsido estas pli interesa ol la televido, ni rajtas esperi multajn. Sed se ni kunsidas por paroli banalaĵojn, aŭ por aŭdi disputojn, ni vane atendos novajn interesitojn. Ĉiukaze, laŭ nia vidpunkto, la esperanto-movado oferas ion multe pli grava ol televido. Ĉu vi samopinias?

AŬDITE, VIDITE, LEGITE

Kongresintoj. La Vankuvera Kongreso estis salutita de nia Asocio, pere de s-ino Julie Regal, el San Miguel de Allende. Alia partoprenanto estis Jesús Nájera, kiu lastmomente decidis vojaĝi al Vankuvero.

“Lingvaj minoritatoj” estis la kongresa temo. Ĉu pro tio ke esperanto estas minoritata lingvo? Eble. Sed por la venonta kongreso, en Aŭgsburgo, Germanio, la temo estas: “Antikvo kaj moderno: kion ŝanĝi, kion konservi?” Eble oni traktos tie, finfine!, ĉu indas konservi aŭ ne la literon ĥo. Aŭ, ĉu oni reprenos la ĉijaran temon kaj estos priparolata la neceso konservi (aŭ ŝanĝi) la lingvajn minoritatojn? Kaj poste, en Pekino, kio estos la temo? Eble la LKK ankoraŭ ne scias. Sed se ni atingas la 1887an Kongreson en Varsovio –la Jubilean– eble ni povos aŭdi ion pri esperanto kaj ties movado. Fina demando: kio okazas al la kongresaj temoj? Kial ili ne estas ligitaj de unu jaro a la sekvonta? En kiu forgesita tirkesto ŝimas la gravaj paroladoj pri la kongresas temoj?

Foririnto. Fine de la pasinta julio, forvojaĝis s-ano Li Weilun al sia lando, Ĉinio. Li pasigis ĉe ni preskaŭ du jarojn, kiujn li profitis por aktivigi en la movado: li donis kurson en la Societo de Amikeco kun Ĉinio, krom verki lernolibron, legolibron kaj novelon. Li lasis ĉi tie bonajn geamikojn kaj rememorojn. Bonan vojaĝon!

Tradukinto. Antaŭ kelkaj semajnoj, Ángel Segura Peralta, prezidanto de la Asocio, finis la tradukadon de *Pedro Páramo*, mondkonata romano de Juan Rulfo, unu el la plej elstaraj verkistoj de Meksikio. Kiu iam legis la romanon, povos imagi la laboron kiun la traduko reprezentas. Certe ne temas pri simpla hispana lingvaĵo, sed pri tre karakteriza meksika parolmaniero. Gratulon al nia s-ano kaj sukceson en la eldonado!

Libroservo. Ángel Luna Cárdenas, kiu ekde tiu ĉi jaro funkcias ankaŭ kiel delegito por Meksiko, prenis sur sin la respondecon de la libroservo. Ĉe li oni povas aĉeti: Plena Gramatiko de Esperanto [48 gld], Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto [130 gld], krom la eldonaĵoj de El Popola Ĉinio. Kontaktu lin tuj! (Tel. 564 0546)

Orwell kaj esperanto en 1984

George Orwell estas vaste preparolata dum tiu ĉi jaro. Tio estas pro tio ke, unu el siaj plej konataj romanoj estas titolita precize *Mil Naŭcent Okdek Kvar*. Kiu ankoraŭ ne legas pri ĝi? Tiu romano ne estas scienc-fikcio propre dirite, sed “soci-fikcio”, ĉar en ĝi la emfazo estas multe pli sur la socia sistemo, ol sur la scienc-teknika aspekto. La aperjaro de la libro estis 1949, kaj ĝi priskribas las situacion en kiu la mondo sin trovus 35 jarojn poste. Ni lasas al la leganto la plezuron malkovri ĉu li pravis aŭ ne.

Sed estas iu nemulte konata aspekto, nome, la rilato kiun Orwell havis al esperanto kaj al aliaj planlingvoj. Orwell estis nevo de Ellen Kate Limouzin, la fidela kunulino de Eŭgenio Lanti. Kiam Orwell vizitis Parizon, li pasigis multajn vesperojn ĉe sia onklino, parolante kaj diskutante kun la fondinto de SAT. Pri esperanto kompreneble ili ankaŭ parolis. Orwell konis ankaŭ “Basic English” de C.K. Ogden, kiel pruvas lastatempe malkovritajn skribaĵoj de Orwell mem, destinitaj al aŭtoro de “Basic”. Ŝajne, Orwell malaprobis la ideon de Ogden.

Sed lia kono pri planlingvoj montriĝas en *Mil Naŭcent Okdek Kvar*. En tiu romano, la brita verkisto priskribas iun “newspeak” (novparolon), kiu permesas al la registaro manipuli la informojn kaj eĉ la penson de la popolo.

Ĉu Orwell malkonfidis la sekvon de iu ĝenerale enkondukita internacia lingvo? Jes, eble li pensis ke tio servus pli al la registaroj por kontroli la popolojn, ol al la popoloj por kleriĝi kaj havi kontaktojn trans la lingvaj baroj. Tial li mokas la tutan aferon en sia romano, pere de tiu ‘novparolo’. Multaj el la antaŭjuĝoj kaj atakoj kontraŭ esperanto devenas el tiu sama penso. Do, la demando estas: ĉu esperanto devas esti je la servo de la registaro en la manipulado de la pensoj; aŭ male, helpi la popolojn malkatenigi la menson de la unuflanka informado? Ĉu esti aŭ ne esti? Jen la demando!

NI ĈIUJ

INFORMILO PRI ESPERANTO